

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten




Fondita 1952

Numero 2

Marto/Aprilo 1971

23-a IFEF-kongreso



Bonan vojaĝon — bonvenon en Jugoslavio


Ion pri eblaj ekskursoj en Jugoslavio

La groto de POSTOJNA

La groto de POSTOJNA estas vizitebla jam de post 150 jaroj. Dum tiu tempo 8 000 000 vizitintoj admiris ĝin. La tuta esplorita vojo-reto havas pli ol 23 kilometrojn. Sur la plej interesaj vojoj veturas elektra funkciigita vagonareto. En la groto la naturo kreis kaj formis dum jarmiloj per la degutinta kalkoriĉa akvo belegajn stalagmitojn kaj stalaktitojn, grandegajn kolonojn kaj admirindajn ŝtonkurtenojn. Ĉio estas fee iluminita.

En ĝi ankaŭ vivas speco de amfibio (PROTEUS ANGUINUS). La IV-a Internacia Kongreso pri Speleologio siatempe elektis la „dancsalonon“ de la groto kiel inaŭgurejon. Ek de tiu tempo ĝi estas nomita „Kongreshalo“.

Estas ankaŭ rekomendinde, viziti „**PREDJAMSKI GRAD**“, en distanco de 9 km de POSTOJNA. La kastelo estas ĉiam malfermata kaj enhavas belan arĥeologian ekspozicion. —



La groto de Postojna

PIVKA kaj ĈRNA JAMA

estas 3,5 km malproksime de POSTOJNA kaj peras tre interesan rigardon tra profunda kratero sur la subteran fluejon de la kaverna rivero PIVKA. En senpera proksimeco ekzistas restoracio kaj kampeto. —

Ankaŭ vizitu la eksterordinare vastajn subterajn halojn de la groto „**SKOCJANSKA JAMA**“. Ankaŭ ĉi tie estas multnombraj vojoj kaj haloj plenplenaj da plej fantaziaj figuroj kaj pitoreskaj metaforaĵoj. Rigardi ilin estas certe an-

kaŭ por vi neforgesebla travivaĵo. —

23a IFEF-kongreso

Ne sendu al LKK monon per poŝto aŭ al poŝtĉekonto aŭ dinarojn, sed nur per la banko al la bankkonto indikita sur la aliĝilo. Ĉar ofte la bankinstitutoj nur rimarkas „por la 23a kongreso“ kaj forgesas la nomon de la paginto/sindinto LKK ne scias al kiu sendi la kongreskarton. Pro tio la aliĝintoj, kiuj

dum konsiderinda tempo post la pago ne ricevis la kongreskarton, bonvolu skribi al LKK, al kiu banko ili konfidis la sendon de sia mono/kotizo. Unuopuloj kaj grupoj estas petataj anonci la adventagon, -traĵnon kaj -horon en Maribor al LKK.

LKK informas, ke post la devalorigo de la valuto dinar je 20% la prezoj en la gastejaj entreprenoj, precipe en hoteloj, ne fariĝis pli malaltaj, ĉar la prezaroj indikis ankaŭ en \$.

PTUJ

Havante multajn historiajn kaj kulturajn monumentojn, kastelon kun ampleksaj muzeaj kolektaĵoj, PTUJ estas vera perlo de Slovenio. En la urbocentro, proksime de la preposta preĝejo, leviĝas la urboturo kun sia barokstila tegmento. Tiu ĉi bildo estas superata de la kastelo, kiu estas konstruita en renesanca stilo. En ĝi estas la kulturhistoria fako de la muzeo. Sed la vera simbolo de tiu antikva urbo staras antaŭ la urboturo: la 5m alta reliefo de ORFEO. La monumento prezentas Dion enmeze de bestoj, kiuj estas allogitaj per la sonoj de lia liro. —

Nepre menciindaj estas ankaŭ la du temploj sur la dekstra bordo de la rivero DRAVA en BREG kaj HAJDINA. Ili estas dediĉitaj al la dio MITRA kaj estas kreitaj en la dua kaj tria jarcentoj.

Korektu vian adresaron en Bulteno 1/71 paĝo 8

Prezidanto: Basa 945/397
Fakterminoj: Basa 955/4824
Stuttgart: TBAmtn Krüger,
Flm Heilbronn, Basa 952/
888/379

Aŭstroj kaj Germanoj kune skiadis

La ĉefsekcio Linz de la Aŭstria Fervojistia Esperanto-Federacio projektis malgrandan skirekontiĝon post la oficiala internacia skisemajno en Châtel (Francujo) kaj invitis al la alpa gastejo Strussing proksime de Werfenweng. Verdire: estis partoprenintoj de antaŭaj IFES-aranĝoj en Aŭstrio, kiuj insiste petis kolegon Geroldinger „fari ion“. Do li faris. Kaj pli ol 40 personoj venis por plene ĝuadi tiun semajnon inter bonaj geamikoj, ĉar tre rapide oni interamikiĝas en



Ptuj — altaro en la gotika prepostpreĝejo

tiu tutspeciala etoso, kiun oni ne povas priskribi, sole partopreninto povas ĝin apreci. Tial mi ankaŭ ne priskribos multajn detalojn, sed sole mencias la ĉefajn vesperajn okazintaĵojn: film- kaj dia-prezentadoj, societaj ludoj, multe da komuna kantado kaj dancado, malgranda poresperanta varbparolado (ĉar ne ĉiuj estis esperantistoj), flampunĉa trinkado en konekso kun spontanee nerazitaj viroj, karnavala kostumbalo... Kai dumtage: dank' al favora vetero skiado laŭplaĉa respektive laŭkapbla, promenado aŭ sunbanado; je la semajnfino skiadkonkursoj en 4

grupoj (komencantoj, virinoj, viroj adoleskaj, viroj pliaĝaj), kostumita „li-kun-ŝi-skiado“, eĉ kaj eĉ manlabora konkurso por la neskiantoj. Kaj valoregaj premioj por la unuaj 3 en ĉiu konkurso! Nenio dum la tuta aranĝo estis deviga, oni apenaŭ rimarkis la lertan manon de la organizanto, konvene subtenita de lia ĉarma edzino; des pli volonte ĉiuj subiĝis al la proponitaj programtempoj. Ĉu mirige, ke sub tiaj idealaj kondiĉoj nepre ĉiuj estis plene kontentaj?

Gernot Ritterspach

Redaktfino por n-ro 3/1971 estas la 10. 6. 1971

Distrikt-komisiito München

Ankoraŭ ĉiam mi estis vojaĝema homo kaj ŝatis kontaktojn kun homoj de aliaj landoj. Tial mi pensis, Esperanto povus esti bona afero kaj komencis en 1954 lerni la Internacian Lingvon per instruaj leteroj de la fervoja faklernejo München. S-ino Hell, ŝi estis tre konata en la munkena Esperanto-rondo, estis mia instruistino kaj mi ĝojis, kiam je la fino de la kurso ŝi skribis al mi: „Vi estis ĝis nun la plej diligenta kaj bona lernanto el la malmultaj, kiuj finis la kurson.“ Kelkfoje mi vizitis poste kunvenojn de la grupo en München kaj parto-



Alfred Giebl

prenis mian unuan IFEF-kongreson 1956 en Stockholm. Tie mi trovis la unu-

ajn kontaktojn kun Esperantistoj el aliaj landoj. La impresoj estis tiel, ke Maribor nun jam estos la 10-a kongreso, kiun mi partoprenos!

Mi havas geamikojn kaj havis gastojn ĉe mi en Garmisch el multaj landoj, ekz. pasintjare de Norvegio kaj Hungario. Mem mi jam ofte povis ĝui la unikan gastamecon de Esperantistoj. Do, mi povas diri, ke mi ne plu povas imagi mian vivon sen Esperanto.

Ĉar en München ne plu troviĝis ema s-ano, laŭ peto de s-ro Gieblner mi transprenis antaŭ du jaroj la postenon de la distriktkomisiito.

Per akvoradio kontraŭ 15 000 voltoj

La Germana Federacia Fervojo forŝprucas malpuraĵojn de sur izoliloj de elektraj konduktiloj

Ankaŭ la DB ne povas ŝanĝi la fakton, ke ordinara akvo bone kondukas elektran kurenton. Pro tio plena akvoradio direktita kontraŭ konduktilo kun alta tensio signifas mortdanĝeron.

Izoliloj havas la taskon, disigi tiujn partojn de la katenariaj instalaĵoj, en kiuj estas tensio, de tiuj aliaj partoj, kiuj estas konektitaj kun la tero. Per fulgo kaj gasoj de preterpasantaj vapor-kaj dizelaj lokomotivoj, sed precipe per la gasoj de najbara industrio, iom post iom ekestas maldika krusteto, kiu konsiderinde povas malgrandigi la izol-kapablon. Tiamaniere estiĝas trans la izoliloj elektre konduktantaj „pontoj“, forkonduktantaj tielnomatajn „rampkurentojn“, kio kaŭzas grandajn energi-perdojn. Pro tio la izoliloj de tempo al tempo devas esti purigataj. Ĝis nun tiucele oni devis malŝalti la kontaktdraton.

La fervoja centra oficejo (Bundesbahn-Zentralamt) en Munkeno (München) evoluis metodon, laŭ kiu eblas tute sendanĝera purigado de katenariaj izoliloj per akvoradio eĉ sub tensio de 15 000 voltoj. Tio okazas helpe de nova ŝprucotrajno. Sur speciale ekipita malferma laborvagono kun enmeza ŝirmtegmento estas muntitaj du tuboj, moveblaj helpe de globartikoj al ĉiuj direktoj. La necesan akvon oni prenas el ne plu bezonata lokomotiv-tendro per pumpilo. La decida diferenco kompare al kutima akvoradio konsistas en tio, ke la uzataj ŝprucaĵoj ja produktas akran radion, tamen disigitan en plej fajnajn gutetojn. Inter la unuopaj akveroj formiĝas tute etaj aeropartikoj, kiuj izolatas tiom forte, ke tia radio forkonduktas sole minimumajn kurentojn kun intenso de nur kelkaj milionoj da amperoj. Jam en distanco de du metroj tia

radio ebligas sendanĝeran laboron, dum praktike oni laboras trans distancojn de 4 ĝis 12 metroj. Krome la metalaj partoj de la ŝprucotubo estas konektitaj al la tero.

Ĝis nun oni evoluis du specojn de ajutoj, el kiuj unu forŝprucas 100 kaj la alia 150 litrojn po minuto. Oni uzas puran akvon sen iuj ajn aldonaĵoj. Per tiamaniere purigado la solveblaj partoj estas ellavataj, tiel ke la izola valoro post la purigado estas proksimume 100 procentojn pli alta ol en malpura stato. Por la purigado de unu izolilo laŭ la nova metodo necesas nur ĉirkaŭ duona minuto kontraŭ 3 ĝis 5 minutoj laŭ permana laboro. La decida avantaĝo tamen estas la ebleco labori sub plena tensio, ĉar tio plej forte influas la nombron de la izoliloj, kiujn oni kapablas purigi potage.

ekstrakte tradukita el „Rad und Schiene“ 8/67 J. Gieblner

Junularo aŭskultu!

Skisemajno en Châtel

Dum la semajno de 16a ĝis la 23a de januaro niaj francaj geamikoj okazigis internacian skisemajnon en la regiono de Savojo. La organizantoj, s-ino Bernier kaj s-ro Wurmser, akceptis en Thonon-les-Bains partoprenantojn el 5 landoj, kiuj alvenis el diversaj direktoj. Speciala aŭtobuso veturigis nin en altecon de 1200 m al la vilaĝo Châtel, rekte antaŭ la pordon de nia restadejo „La Chaumière“. Agrabla kaj varma atmosfero ĉirkaŭis nin tuj en la komenco, kiam la ĉarmaj domposedantoj kun siaj helpantoj bonvenigis nin. Ĝi restis same agrabla dum la tuta semajno.

La organizo estis perfekta. Ĉiuj tuj sciis la ĉambron kaj post nur kelkaj minutoj ni troviĝis ĉe la tablo. La kuirestro ĉiutage surprizis nin per abundaj kaj variaj specialaĵoj. La vino, ĉu blanka, ĉu ruĝa, trovis ĉies plaĉon kaj ne tro streĉis la monujon. Ĉarma hispana servistino Ana-Marie post nur 2 tagoj komencis kompreni kaj respondi en Esperanto. Humorplene ŝi sciis sin defendi kontraŭ ĉiu ajn atako.

La skiantoj jam survoje seniluziigis. La suno brilis, sed ne estis sufiĉe da neĝo por bone skii. Necesis iri per kabinlifto al Super Châtel. Tie montriĝis pli bonaj cirkonstancoj. Bela panoramo rekompencis la elspezojn. Salutis nin tie la montarĉeno de „Dents du Midi“ kaj la pintoj de „Montblanc“. Ni ja estis proksimaj de la svisa landlimo. Multaj inter ni laŭplaĉe eluzis la okazon viziti la svisan lokon Morgins, ĉu skiante, ĉu per aŭtobuso, ĉu piede.



La Chaumière

Ĉiuvespere estis amuzaj programoj. Dum la interkona vespero reciproke sin prezentis 46 gepartoprenantoj el Aŭstrio, Belgio, Germanio, Svedio kaj Francio. Pro malsano kelkaj ne povis veni, inter ili bedaŭrinde ankaŭ troviĝis s-ro Delaquaize kun familio. Tiel ne eblis persone danki lin pro la bona preparo de radio-krokodilo (humorplena raportado). La junularo distris nin per kelkaj allogaj aranĝoj. Jam delonge ni ne tiom ĝis larmoj ridis, kiel dum la prezento de plenkreskaj beboj. Ĉiam la dancistinoj rikoltis aplaŭdon, kiam ili invitis nin al komunaj dancoj. Aparte ĉarma estis la karnavala vespero, kiu daŭris ĝis post la kvara horo matene. La domestroj ĝuis ĝin same kiel ni kaj kelkaj gastoj. Mirinde kun kiom malmultaj rimedoj ĉiuj venis en belaj kostumoj. Ĉarmulinoj de la tuta terglobo prezentis sin, kiam speciala orkestro invitis al dancado. Harema gardisto, paĝio, kapitano, kanibalo, knabo de Tirolo, banemulo en kostumo de la lasta jarcento, Johano kiel servistino, Mao venis el Ĉinio kaj eĉ Mozart (cetere tre belaspekta en la origina peruko) ne preterlasis okazon defili

kaj ĵeti la ĉarmon al dezirata viktimo. Dum tiu ĉi nokto la humoro atingis la kulminon; neniu antaŭ fino povis dormi.

La neĝo, kiu falis preskaŭ seninterrompe dum 2 tagoj kaj 2 noktoj, ĝustatempe ĉesis por ebligi skikonkurson. Partoprenis ĝin spertuloj, progresantoj, komenctantoj kaj eta knabino Corinne laŭ siaj kapabloj. Lokaj skiinstruistoj mezuris la tempon kaj donis la rezultojn. Kelkaj malbonŝanuloj falis kaj rezignis la konkurson.

Okazis ankaŭ oratora konkuro. Ĉiuj ĉeestantoj partoprenis ĝin. Tio estis laŭ mia opinio la plej bona fakto. Neniu rezignis, neniu fuĝis. Ĉiu kun pli aŭ malpli da kuraĝo plenumis aŭ la memelektitan aŭ la donitan temon. La juĝistaro ne havis facilan taskon trovi en la diversaj kategorioj la plej bonan disĉiplon. Nia germana kolegino Dagmar Blaschke ricevis — kiel la plej bona progresantino — la libron „La eta princo“. Ĉiuj premioj, ĉu de la oratora konkuro, ĉu de la skikonkurso, estis donitaj la saman vesperon. La gajnintoj rikoltis riĉan aplaŭdon. Riĉan aplaŭdon ankaŭ ricevis Edmund

Wurmser, kiam li invitis ĉiujn partoprenantojn al lasta aperitivo. Li tiom bone defendis kaj mastrumis la kason, ke tio eblis. Gratulon al li.

Apartan gratulon meritas Josette Bernier. Ŝi vere majstre regis la situacion. Ĉiam afabla kaj ĝentila ŝi traktis la diversajn aferojn. Neniu estis inter ni, kiu dum tiu ĉi semajno ne minimume unufoje ĝuis ŝian helpemon. Ŝi tiom

agrabligis nian restadon en Châtel, ke kun la nomo „La Chaumière“ estas ligita la simpatia rideto de Josette. Koran dankon al ŝi.

Specialan dankon mi ankaŭ direktas al la junularo, kiu prizorgis la distran parton de tiu ĉi aranĝo.

Nome de la GEFA-estraro mi invitis al la venonta skisemajno, kiu okazos de la 5a ĝis la 12a de februaro

1972 en la bavaraĵoj apud Spitzing-lago.

Kurt Jentsch transprenos la kasaferon, Elfriede Kruse respondecos la organizadon. La programon mi metis en la manojn de la junularo. Do, ĝejnuloj pripen-su! La venontaj ĝepartoprenantoj ankaŭ atendos amuzajn aranĝojn. La unuaj jam aliĝis.

E. Kruse

GEFA gratulas

Kurt Jentsch


Tio estis surprizo ambaŭflanka, kiam antaŭ jaro pro preparoj por nia 14a jar-kunveno serĉante kunlaboranton de GV Darmstadt, mi malfermis pordon brutremantan kaj vidis en mezo de gaja rondo nian GEFA-kasiston, adiaŭe regalantan la gekolegojn el sia tiama oficejo BA Darmstadt. Jes, jam unu jaron li troviĝas en tiu dejora stato, kiun la germana lingvo erare nomas ripozan. Senlace okupita Kurt Jentsch ne nur fidele kaj zorgeme ankoraŭ administras niajn financajn aferojn, sed samtempe trovas ankoraŭ energion por varbi adeptojn, organizi kursojn, kompili dia-prelegojn, aranĝi ekspoziciojn; la naturamiko lin ŝatas kiel kamaradon kaj inter BSW-fotoamatoroj li gajnis jam belajn premiojn.

La 19-an de februaro Kurt Jentsch havis 63 jarojn. Juna homo ankoraŭ, ĉar liaj multflankaj interesoj lin junigas, kvankam varia sorto kundukis lian familion el Weißenstein en Silezio al Frankfurt. Malpli ol dek jarojn antaŭ emeritiĝo li lernis ankoraŭ la Internacian Lingvon kaj jam en la IFEF-kongreso de Ful-

da li provis sian kapablon pri sia hodiaŭa ofico en GEFA. Ni deziras bonfarton kaj ankoraŭ multajn jarojn da aktiva kunlaboro en la estraro.



Kurt Jentsch



Otto Schmidt

Otto Schmidt

Kiam la verda aŭto en Halle (Saale) logis la ju-

nan inĝenieron Otto al tiu ĉi idealisma movado, la unua mondkongreso de Esperanto apenaŭ estis pasinta. Naskita la 16an de marto 1886 li ĵus plenis la 85-an vivojaron. Sian profesion karieron li komencis inter Berlin kaj Stettin kiel kanalkonstruisto. Post pluraj jaroj ĉe la saksa fervojo li sekvis vokon al Sudokcidenta Afriko, kie apud Windhuk li konstruis la ĉeflinion de la tiama kolonio.

De 1913 ĝis lia emeritiĝo en 1951 Otto Schmidt deĵoris kiel fervoja inĝeniero en la direkcia distrikto Münster. Li apartenis al la unuaj membroj postmilitaj de GEFA kaj kiel subsekcioestro por Esperanto en sia distrikto kunigis 40on da kolegoj, aranĝis kursojn en la fervoja faklernejo kaj kunfondis la grupon Münster, kies kasistan oficon li ĝis hodiaŭ sperte kaj egale ekzakte plenumas.

De Paris ĝis Stockholm li partoprenis preskaŭ ĉiun IFEF-kongreson kaj ankaŭ fervore disponigis sian kapablon al organizado de la 6-a GEFA-jarkunveno. GEA transdonis al li sian honoran medalon. Bonhumore Otto Schmidt aktivis en la loka grupo ĝis lia artrito pli kaj pli katenis lin al la domo.

Hodiaŭ restas al li, poligloto laŭ destino, nur la korespondaj fadenoj al amikoj kaj kolegoj en la vasta mondo. GEFA esperas laŭeble resaniĝon, deziras al li ankoraŭ multajn belajn jarojn kaj dankas pro lia fidela kunlaboro. -p-

El la grupoj

Stuttgart

Egon Kiefer invitis — kaj ĉiuj, ĉiuj venis ...

Al Laupheim, situanta apud la supraŝvaba barokstrato sin direktis sabaton, la 27an de Februaro, multaj esperantistoj ne nur el la distrikto Stuttgart. Egon Kiefer, la distriktkomisiito, invitis por la 16a horo kaj kun ĝojo oni povis konstati, ke la salono de la gastejo „Raben“ je tiu horo jam estis tute plena. S-ro Jocham salutante bonvenigis ankaŭ geamikojn el Augsburg, Frankfurt kaj Weiden. Eĉ IFEF-kasisto Walder el Svislando sendis salutleteron dezirante multe da sukceso al la aranĝo. Kaj jen tuj mi volas anticipi, kion oni kutime nur fine de raporto legas: la aranĝo vere estis granda sukceso. Tion kaŭzis ne sole la programsinsekvo (alparoloj, salutoj de gastoj, laŭtleĝo de jarraporto, prezentado de diapositivoj kaj filmoj, interrompita de virhora kantado); devige la programoj de tiaj aranĝoj similas unu la alian, la sukcesrecepto de amiko Kiefer estas la maniero, kiel interesigi la homojn kaj poste — multe pli grave! — teni ilin. Jen evidenta pruvo: en Laupheim la solonon ne nur plenigis esperantistoj, sed ankaŭ konsiderinda nombro da „ceteraj personoj“. La programo komenciĝis per virhora prezentado. Egon Kiefer sukcesis venigi dek membrojn de fervo-

jista kanthoro Stuttgart por plezurigi la aŭskultantaron. Li mem estis inter la deko kaj parte ili kantis en Esperanto. Sekvis salutvortoj de s-ro Jocham, s-ro Kiefer, s-ro Maxein (BSW Stuttgart, eĉ en Esperanto) kaj s-ro Ritterspach (nome de GEFA). Kiel dankesprimon pro multjara distriktkomisiita agado s-ro Jocham transdonis al s-ro Kiefer ĉarman donacon, dum s-ro Kiefer siavice honorigis per prezentoj siajn amikojn kaj helpantojn s-ro Jocham, s-ino Glas, s-ro Matthes kaj ges-roj Kärcher. Jen konciza elti-raĵo el la jarraporto: 78 membroj, regulaj ĉiusemajnaj renkontiĝoj, dum kiuj oni ankaŭ akceptis gastojn el Izraelo, Japanujo, Usono, Ĉilio, Francujo kaj Jugoslavio, multnombra partopreno ĉe la lasta jarkunveno en Ulm kaj ĉe diversaj internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj.

Al la neesperantistoj s-ro Ritterspach direktis laŭ pe-ton enkondukajn vortajn pri la Internacia Lingvo, poste s-ro Kiefer informis la ge-aŭskultantojn pri la venonta IFEF-kongreso en Maribor, Jugoslavio. Liajn vortojn kompletigis 2 belaj sonfilmoj pri tiu kongreslando. Ke temis pri fervojistoj (simpatiaj homoj, ĉu ne?), kiuj kunsidis en Laupheim, tion oni spertis plej malfrue kiam komenciĝis la filmo „La aŭtomata kuplilo“. Jam estis kutimo, ke tiujn jarkunvenojn plibeligis Marianne Braun, la ĉarma Laupheimanino, per modkantoj. Ĉi-foje ŝi estis malhelpata esti inter ni, sed ŝia frato Hans-Albert pruvis, ke li majstras lerte la gitaron, des pli, ĉar lia amiko Wolfgang Schuler asistis lin. Diapozitivaj pri la lastaj skisemajnoj en Châtel

(Francujo) kaj Werfenweng (Aŭstrio) estis lasta programero, antaŭ ol la dancemuloj ekaktivis kaj Michel Schranz, jam konata humoristo inter ni, komencis ataki niajn diafragmojn.

La lokomotivestro de Tauern-Expreß certe miris, ke li ricevis ordonon por eksterordinara halto en Laupheim, unu horon post noktmezo. (Ĉu mi jam aludis, ke temis pri fervojistoj...?) Estis la lasta fojo, ke Egon Kiefer prezidis jarkunvenon en la distrikto Stuttgart, kaj la lasta fojo, ke la bonege kunlaboranta duopo Jocham/Kiefer komune organizis tian aranĝon. La plena harmonio inter ambaŭ havigis al ni jam kelkajn jarkunvenojn en fama ŝvaba „Gemütlichkeit“ kaj pro tio ni ĉiuj, kiuj foje ĝuis la rikolto de ilia kunlaborado, kore dankas al ambaŭ. S-ro Jocham ekde la 1a de Marto ricevis novan postenon en Ulm, s-ro Kiefer ekde Aprilo laboras en Frankfurt. Multe da sukceso ni esprimas al la kara duopo kaj direktas niajn bondezirojn jen al Ulm, jen al Frankfurt! La posteulo, s-ro Krüger el Heilbronn, certe trovas bonajn kunlaborantojn en sia distrikto.

Elisabeth Ritterspach

Wuppertal/Hagen

La kunsido okazas ĉiun duan lundon monate nun en gastejo „Zum Güterbahnhof“, Fehrbellinerstr. 1, proksime de la ĉefstacidomo Hagen/Vesfalia.

Koresponddeziro

26jara inĝeniero deziras korespondi pri fervojaj modeloj, interŝanĝo de perspektivoj, modeloj ktp. Inĝ. Mach Jaroslav, Praha 4-KRC/ĈSSR, Pod Višňovkou 16/422.

Turismaj prospektoj

Kalmar — urbo kie modernaj homoj bonifartas. Turistbroŝuro en naŭ lingvoj. inter kiuj en Esperanto. Kun ampleksa mapo pri la urbo kaj regiono. Prezo: 5 sv.kr. Mendebila ĉe Tursita Oficejo, Olandshammen, S-38100 Kalmar, Svedujo.

Trento, Monte Bondone, Lago Caldonazzo, Dolomitoj — Italujo. Bele eldonita kolora turisma faldfolio, 9,5 x 23,5 cm. Esp.-grupo Trentino, Via Cavour 17, I-38100 Trento, Italujo.

Ravenna. Esperanta gvidlibro, IV-a eldono. 32 p., 11,2 x 16,3 cm. Eld. Azienda Autonoma di Soggiorno,

Via XIII Giugno 2, Ravenna.

Bologna (Italujo), turisma faldfolio 11,6 x 16,6 cm kaj **Bologna** (22 x 22 cm), broŝuro kun ilustraĵoj, 12 p. Eld. Turisma Oficejo de Bologna.

Rimini riviera — kvarpaĝa Esperantoaldono al la kolora prospekto, 10 x 21 cm. **En Italio por viaj rendevuoj kun la suno,** informa faldfolio eld. de Ĝen. Dir. de Italaj Stataj Fervojoj en Romo.

El: Heroldo

Neusiedlersee, Burgenland (Aŭstrujo). Esperantoaldono al la kolora faldfolio. Eld. Amt der Burgenländischen Landesregierung,

Abt. Fremdenverkehr, Eisenstadt.

Poŝtkarto pri Rimini, kun speciala poŝtstampo uzita dum la 22 a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso; ricevebla ĉe IFEA, Via Donato Creti 61, I-40128 Bologna, Italujo.

TRILANDA — ESPERANTO — RENKONTIĜO

La Esperantista Rondo Aachen invitas al TRILANDA — ESPERANTO — RENKONTIĜO, okazonta la 16an de majo 1971 en Aachen, Wilhelmstr. 50. La kunvenejo situas tute en la proksimeco de la stacidomo.

Informojn donas Paul Firmenich, Jahnstrasse 5, 519 STOLBERG.

Feriaj renkontigoj

Printempaj Ferioj apud Bydgoszcz

De la 4-a ĝis la 17-a de majo 1971 okazos en Lubostron apud Bydgoszcz (Pollando) Printempaj Esperanto-Ferioj, kiuj plene utiligos spertojn de la aŭtunaj Ferioj en Miedzygórze. Lubostron situas en la arbaro ĉe la rivero Noteć. Ripozejo por 80 geesperantistoj estos klasikstila palaco (1800 j.) troviĝanta en malnova parko. La programo antaŭvidas: Seminarion „Esperanto-libro — ĝia signifo en internaciisma edukado“, Esperanto-kurson por komencantoj, progresantoj kaj Esperanto-instruistoj, prelegojn kaj interesajn ekskursojn. La Feriojn aranĝas Voj. Estraro de Pola Esperanto Asocio, ul. Pomorska 23/5, Bydgoszcz.

Somera Universitato en Hungarujo

La Somera Esperanto-Universitato — fondita en 1963 — okazos de la 4-a ĝis la 10-a de julio 1971 en Gyula (Hungarujo). Oni antaŭvidas naŭ prelegojn pri muziko, belartoj, scienco kaj literaturo.

Aliĝoj estas akceptataj ĝis la 31-a de majo ĉe Somera Esperanto-Universitato — TIT — 48-as u. II, Gyula, Hungarujo.

el: Heroldo de Esperanto

Ĉefministro de Bavario Alta Protektanto

La ĉefministro de Bavario, d-ro Alfons Goppel, deklaris sin preta esti Alta Protektanto de 49a Germana Esperanto-Kongreso okazonta de la 9 — 12 aprilo 1971.

Esperanto en bibliotekoj

Pli kaj pli da germanaj bibliotekoj kaj sciencaj institucioj interesiĝas pri Esperanto-literaturo. Specialan intereson trovas la PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO, kiun mendis antaŭ kelkaj tagoj la universitata biblioteko de Tübingen. La lingvo-scienca seminario de Munkeno petis pri katalogo de Esperanto-literaturo.

Fahrvergünstigungen

Die Bestimmungen für **Fahrten auf ausländischen Strecken** sind neu gefaßt worden und bringen gegenüber dem bisherigen Stand gewisse Verbesserungen. Betroffen sind in erster Linie Pensionäre und Rentner sowie deren Witwen, außerdem auch Kinder bis zu 25 Jahren von Aktiven und Ruheständlern. Erkundigen Sie sich bitte bei Ihrer Dienst- oder Betreuungsstelle.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerkes, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanto Fervojista Asocio.